

---

# STARTO



---

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1975 2 (48)

1945



1975

**NI SALUTAS  
30-AN DATREVENON DE LIBERIGO  
DE ĈEĤOSLOVAKIO  
FAR SOVETA ARMEO \***



## komuniko

## komuniké

PRI LA 7-a KONSULTIĜO DE LA E.-ASOCIJOJ EN LA SOCIALISMAJ LANDOJ  
O 7. PORADĚ ZÁSTUPŮ ESPERANTSKÝCH SVAZŮ V SOCIALISTICKÝCH ZEMÍCH

En la tagoj 29.3.-1.4.1975 okazis en Mělník apud Praha la 7-a Konsultiĝo de reprezentantoj de la Esperanto-asocioj kaj movadoj el Bulgario, ĈSR, SSR, GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetunio.

La Konsultiĝo traktis la formojn kaj metodojn de plua kunlaboro de la reprezentitaj organizaĵoj por la plibonigo de la stato de la esperantista agado en la koncernaj landoj kaj en la internacia E.-movado.

La Konsultiĝo aparte okupiĝis pri la taskoj de la koncernaj E.-organizaĵoj lige kun la 30jara jubileo de la venko super la faŝismo en la dua mondmilito.

Ankaŭ la Internacia Virina Jaro estis diskutita por esplori la plej taŭgajn formojn de partopreno fare de la respektivaj E.-organizaĵoj en tiu ĉi tutmonda aranĝo.

En la diskutoj pri la neceso de sciencia esploroj pri IL kaj pli speciale pri E-o el vidpunkto de la marksismo la partoprenintoj notis kun granda kontento la fondiĝon de Problema grupo pri la demando de internacia helplingvo ĉe la Instituto por lingvistiko de la Soveta Akademio de Sciencoj.

La Konsultiĝo turnis sin al la Komisiono por Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj kun la propono fari la necesajn paŝojn por la organizo de la 9-a Konsultiĝo en Moskvo, lige kun la 60jara jubileo de Granda Oktobra Socialisma Revolucio. La loko kaj dato de la 8-a Konsultiĝo estos definitive fiksitaj post esploro de iuj cirkonstancoj.

Mělník/Praha/, la 1-an de apr.1975

Ve dnech 29.3.-1.4.1975 se konala v Mělníku u Prahy 7.porada zástupců esperantských svazů a hnutí BIR, ĈSR, SSR, NDR, MLR, PIR a SSSR.

Porada projednala formy a metody další spolupráce zastoupených organizací v zájmu zlepšení esperantské činnosti v příslušných zemích a v mezinárodním esperantském hnutí.

Porada se zabývala zvláště úkoly příslušných esperantských organizací v souvislosti s 30.výročím vítězství nad fašismem ve druhé světové válce.


Na pořadu jednání byl rovněž Mezinárodní rok ženy a nejnvdnější formy účasti zmíněných esperantských organizací v této celosvětové akci.

V diskusích o nutnosti vědeckých výzkumů problematiky mezinárodního jazyka, zejména esperanta, z hlediska marxismu, účastníci zaznamenali s uspokojením vytvoření studijní skupiny pro otázky mezinárodního jazyka při Jazykovědném institutu Akademie věd SSSR.

Účastníci porady se obrátili na Komisi pro mezinárodní styky sovětských esperantistů s návrhem, aby podnikla nezbytné kroky k přípravě Deváté konsultativní porady v Moskvě, v souvislosti se 60. výročím Velké Říjnové socialistické revoluce /1917-1977/. Místo a doba konání 8. porady budou definitivně stanoveny po prozkoumání některých okolností i technického rázu.

Mělník/Praha/, 1.dubna 1975

## AL, ĈS. VIRINOJ



Ni salutas vin okaze de la fondiĝo de Internacia Virinfederacio, kies celo estas batali kontraŭ la milito. La alvoko de la Federacio memorigas la homojn ne forgesi la teruraĵojn, kiuj faris la faŝistoj ĉie en la mondo. La virinoj volas pacon, ili volas defendi la vivon. Akceptu nian korean estimon, bonan sanon kaj sukcesplenan estonton en via MEM-movado.

En la nomo de MEM-anoj Irena Praanig, Pécs, Hungario

## NE NUR DUM LA JUBILEA JARO

En ĉi tiu jaro soleneas nia popolo la tagon la 9-a de majo, kiu estas ŝtata festotago de ĈSSR memore al ĝia liberigo fare de la herooa Soveta armeo antaŭ 30 jaroj.

Je tiu ĉi okazo estas grave, ke ni ĉiuj konsciigu kun profunda dankemo al Soveta Unio, nia plej bona aliancano kaj al ĝiaj fratecaj popoloj, ke ili per la glora venko kaj frekaso de la barbara nazia regno de Hitler, savis niajn popolojn de la grave minacinta fizika ekstermo. Ni neniam rajtas forgesi la 20 milionojn daperditaj vivoj kaj pluaĵn 20 milionojn da vunditoj, per kiuj pagis la soveta popolo por liberigi sian patrujon kaj savi - komune kun la ceteraj aliancanoj - de la malhomeca nazia milit-reĝimo la tutan Eŭropon, do ankaŭ nin!

Nur sekve de la eventoj antaŭ 30 jaroj, per kiuj samtempe finiĝis en Eŭropo la plej granda kaj terura milito de la homa historio, ni povas vivi en paco. Ni povas konstrui sukcese nian socialisman respublikon, ĝui kaj festi danku la belajn majotagojn kaj antaŭgoĵi je multaj belaj travivaĵoj dum la venontaj sunaj somertagoj enkadre de ĉs. Sparta-klado kaj de diversaj renkontiĝoj, someraj tendaroj ktp.

Por ni, esperantistoj, signifis la liberigo en 1945 novan, eble plej grandan progreson de la movado kaj de ĝia grava publika agado - bedaŭrinde miskomprenne interrompita en la 1952-a jaro. Sed la movado havis firmajn radikojn kaj ĝi denove, paŝon post paŝo sub la estinta ĈSEK, povis reakiri la oficialan ekzistotaĵon kaj pluan impeton, kiu kulminis per la starigo de la ĉeĥa kaj slovaka asocioj en 1969.

En la jaro 1972 ni estis notinde embarasitaj per prokrasto de la 2-a kongreso de nia Asocio en Ostrava. Laŭ mia opinio - malgraŭ ke la afero ankaŭ al mi ne estis agrabla - ĝi ne devas nin iel malmobilizi - kontraŭe, instigi al ankoraŭ pli fervora, celo-konscia laboro. La tuta problemo tuŝas ne nur la kongreson, ĝi estas multe pli vasta. Tamen pri la tuta pozicio kaj agadlinio lige kun la tuta movado, kiu post la eventoj en la jaroj 1968-1969 ne estis klara kaj sufiĉe kontentiga.

La Asocio, kiu konstituigis ĝuste dum la kriza periodo de nia lando, faris laŭ siaj eblecoj kaj fortoj ĉion necesan por la plua disvolvigo de nia movado kaj ankaŭ por la sekurigo de ĝiaj rilatoj al niaj politikaj kaj ŝtataj taskoj. Pri tio vi estis sufiĉe bone informitaj pere de Starto, Informoj de la estraro de ĈEA kaj en la kluboj buŝe de niaj aktivuloj.

Malgraŭ tio iuj niaj esperantistoj ne akceptis aŭ ne komprenis la politikan sintenon kaj la agadmanieron de la Asocio. Multaj el ili pro tio eĉ ne fariĝis ĝiaj membroj. Aliaj - kvankam ili aniĝis kaj plenumas diversajn funkciojn en la kluboj, sekcioj de ĈEA ktp. - provas nivan, malsinceran "kaŝludon". Je ĉiu okazo ili protestas hipokrite kontraŭ la politiko en la E.-movado, intrigas kontraŭ la progresemaj kaj iniciatemaj samideanoj kaj kontraŭ la Asocio. Oni videble neglektas la publike utilajn taskojn, inkluzive de tiel noblaj aferoj, kiaj estas ekzemple: la porpaco movado, protestkampanjo kontraŭ teroro en Ĉilio, subteno al la naciliberiga batalo en Vjetnamio, kiu bedaŭrinde plu estas aktuala, same kiel la justa lukto de la popolo en Norda Irlando kontraŭ la senkompata brita subpremo... Per tia konduto oni servas al la plej gravaj malmakoj de la Esp.-movado, farante tamen politikon, kvankam la tre malbonan.

Krome, ekzistas ankoraŭ ĉiam malsaĝaj, anakronismaj tendencoj al nura agado "Esperanto por Esperanto" kun laŭokazaĵaj pure formalaj problemoj pri bonaj intencoj, sen adekvataj agoj. Tiuj ĉi tendencoj, memkomprene, ne helpas la movadon kaj ties ekzistotaĵon, ĉar la sekteca agado estus por la socio tute senutila. En tiuj ĉi cirkonstancoj la estraro de ĈEA verdire ne estus sukcesinta sekurigi la necesajn kondiĉojn kaj dokumentojn por la efika rezulto de la 2-a kongreso.

Nun estas la tasko de ni ĉiuj konsciencie ekzameni ĉiujn niajn mankojn kaj ankaŭ niajn eblecojn kaj streĉi nian tutan bonan volon kaj fortojn por la plua firmigo de la movado kaj ĝia sekura disfloro. Kiel modelo povus al ni servi la movado en Bulgario. Tie ĝi politikan pozicion kaj sukcesan agadon ni ofte prave envidias; bedaŭrinde, ĝis nun ni ne kapablis aŭ ne emis aĝi same pozitive kaj senrezerve kiel la bulgaraj esperantistoj. Pri tio atestas ankaŭ unu ekzemplo el la organizita sfero: dum 5 jaroj post la fondiĝo de nia Asocio, malgraŭ la preskribo de la Statuto, pluraj alvokoj, sugestoj kaj admonoj ĝis hodiaŭ ne ĉiuj kluboj kaj rondetoj fariĝis lokaj grupoj de ĈEA, akirinte por la asocio nur ĉirkaŭ 2500 pagantajn membrojn. Tio ne atestas pri la efektodona laboro de niaj multaj kluboj kaj rondetoj kaj pri ilia sincera rilato al la Asocio, ĉar ni scias, ke antaŭe estis registritaj en ĈSEK pere de EK kaj ER preskaŭ 4000 membroj!

En sincera kunlaboro de ĉiuj honestaj kaj konstruive agemaj esperantistoj kaj kun klara perspektivo, en konkordo kun la Ĝenerala konstruado de nia socialisma patrujo, ni kuraĝe daŭrigu nian por- kaj peresperantan laboron, al novaj sukcesoj kaj kun ĝojo pri bone faritaj taskoj favore al nia nobla afero!

Tiamaniere ni kontribuu ankaŭ al plensukcesigo de la solenaĵoj okaze de la 30-a jubileo de la liberigo de nia patrujo. F.Sviták

## Grava decido el USSR

Kiel konate, la 18an de oktobro 1973 la prezidinto de la Akademio de Sciencoj de USSR decidis, ke la sekcio literaturo kaj lingvo de la Instituto por lingvistiko "esploru la problemon de la helplingvo por la internacia trafiko kaj ĝiajn aplikeblojn en la nuntempaj kondiĉoj."

Kvankam kun malfruigo ni nur hodiaŭ povas pli konkrete informi pri la decido de la nomita Instituto, kiu sekvis en majo 1974 kaj laŭ kiu estiĝis "problemgrupo" gvidata de ĉ-ro fil. M. Isajev, la gvida scienca laboranto de la Instituto. Tiu ĉi grupo konsideros en siaj esploroj la jenajn ĉefproblemojn:

1. Teoriaj problemoj de la helplingvo por la internaciaj rilatoj,
2. Historio de kreiĝo de artefaritaj lingvoj,
3. Tipologio de artefaritaj lingvoj,
4. Spontanaĵoj kaj konsciaĵoj en la procezo de la lingva evoluo,
5. Strukturo kaj funkcio de Esperanto kiel internacia helplingvo.

## Vojaĝo al amikoj...

Ni estis 12 ĝelernantoj, kiuj ekveturis al feria vojaĝo en la urbon Ostrov, okcidenta Bohemio, el Ronneburg, GDR. Deletero de ok esperantistoj atendis nin en la stacidomo Karlovy Vary kaj montris al ni kun granda komplezo la vidindaĵojn de la monifama banloko. Kvar el ili dadrigis la vojon kun ni al Ostrov, kiun ni atingis la 8an de februaro posttagmezo. Alvojaĝis tien ankaŭ infangrupo el Ĉeb kaj la esperantistoj el Teplice. Bonan aplaudon rikoltis niaj kantoj. 30 ĝelernantoj subskribis la protestleteron kontraŭ la krimoj de la ĉilia ŝunto. Per autobuso ni veturis la sekvan tagon al la ĝanista urbeteto Jáchymov kaj vespere denove al Ostrov, kie niaj gastigantoj tre lerte organizis kvizon por la ĝelernantoj.

Nia vojaĝo al Ĉeĥoslovakio estis neforgesetla travivaĵo, instigo por la novaj progresoj.

Al la letero de Kurt Deep, la kursvidanto

## ESPERANTISTO RAKONTAS

### ~~LA LASTAJ TAGOJ EN KONCENTREJO~~

Dum januaro 1945 la plej granda strategia grupiĝo de Soveta armeo ekis militiron trans Vistulon kaj Odron direkte al Berlino. Ĉi tiu ofensivo anoncis jam la finon de la dua mondmilito.

Por ni, arestitaj partoprenantoj de la kontraŭnazia rezistomovado tiu ĉi situacio estis treege ĝojiga kaj ni malpacience eĉ dezirege atendis baldaŭan liberiĝon. Kvankam la Soveta armeo sukcese kaj rapide antaŭmarŝis, por ni la tagoj pasis malrapide, ĉar la kondiĉoj en la naziaj malliberejoj kaj koncentrejoj de tago al tago iĝis pli kaj pli teruraj. La nazioj jam antaŭsentis malbonan finon kaj tial ili estis ege furiozaj.

Komence de februaro la nazioj komencis likvidi la malliberejojn kaj koncentrejojn sur la teritorio proksime de la soveta fronto kaj malliberulojn transporti okcidenten. Ĉi tiu faro estis malfeliĉo por ni. Ja iu ajn prokrasto de nia liberiĝo plimultigus la suferojn kaj la viktimojn.

Ankaŭ nin oni transportis al Hamburgo kaj post preskaŭ tritaga "marŝo de la morto" enpulis nin en la koncentrejon en Kiel. La vivo estis tie nekredeble terura kaj malesperiga. Treege senfortigitaj, malsataj kaj malsanaj ni devis tutan tagon senripoze pene labori. Iom da varma nigra "kafo" /glana dekokaĵo/, peceto da pano bakita el farunmaksajo - tio estis matenmanĝo. Antaŭvespere, en akvo kuiritaj pecetoj da napo - tio estis tagmanĝo kaj vespermanĝo samtempe. La kuŝbretoj estis sen pajlosakoj, sen kovrilo. Ni demetis nek la vestaĵojn nek ŝuojn. Kompreneble, ni ne lavis nin, la akvo por lavi aŭ por trinki simple ne estis. Matene je la sesa la blokestro enkuris la barakon kaj kriegis "aufstehen" /germ. Levu vin! - rim./ Se iu ne leviĝis rapide, li batadis tiun per bastonego. Multaj povis leviĝi nur kun helpo de apudkuŝanta kamarado.

La apelojn /1/ oni faris glate kun la ĉeesto de la SS-anoj kaj blokestroj, kiuj furioze kriegis, per bastonoj batadis, piedbatis aŭ eĉ kontraŭpafadis nin. Same ili faris dum la laboro. Malsataj, malsanaj, ege malfortaj malliberuloj faladis dum la apelo aŭ laborante, en ĉiu momento. Malfeliĉuloj, kiuj falis, tuj estis mortpafitaj. La kaptitoj eĉ amase mortadis je ftizo, tifo, pro malsato kaj pro aliaj sekvoj de kelkjara aresto. En tiu ĉi koncentrejo, kie oni uzadis ĉiujn metodojn de la ekstermado, estis nenia espero liberiĝi.

Kaj tamen, la 30-an de aprilo la Soveta armeo konkeris Berlinon. La situacio rapide ŝanĝiĝis. Foje, antaŭ noktomezo, subite okazis apelo. Rapide ni kuris sur la apelplacon, kie jam atendis armitaj SS-anoj kun preparitaj maŝinpafiloj. Ĉu por likvidi nin? Ni silente flustris. En tiu momento la aviadiloj transflugis la koncentrejon kaj per raketoj hele lumigis la apelplacon. Rapide ni kuŝiĝis teren. Subite la britaj bombaviadiloj aperis super la haveno kaj bombatakis ĝin.

Post preskaŭ unu horo la bombatakoj finiĝis, ĉio eksilentis. Neniu al-kriis nin, eĉ ne unu SS-anon ni vidis. Diskutante kaj babilante ni revenis la barakojn kaj atendis, kio estos, kio okazos matene. La sekvan tagon neniu alvenis, la SS-anoj malaperis, nur la turgardistoj restis. Nenia manĝaĵo, nenia zorgo pri ni. La trian tagon posttagmeze la urbaj policanoj vicigis nin, ĉiu el ni ricevis porcion da pano kaj oni gvidis nin al haveno. Tie ni aŭdis ĝojigan sciigon, ke la sveda Ruĝa Kruco savis nin, do ni estos transportitaj al Svedio.

La longe, senpacience kaj senespere atendita tago de liberiĝo fine al-

/1/ Slango: perioda vicigo de kaptitoj por kontrolo ka.

venis. Bedaŭrinde ne por ĉiuj. Multaj grave malsanaj mortis sur la ŝipo kaj iliaj korpoj estis ĵetitaj en la maron. Multaj mortis ankoraŭ en Svedio. Ankaŭ mi sur la ŝipo malsaniĝis je tifo. Malgraŭ ĉio, feliĉe, preskaŭ post kvinjara malliberiĝo mi postvivis kaj alvenis Svedion. Tiu ĉi lando ne estis por mi tute fremda. Proksime de nia malsanulejo loĝis ja mia sveda Esperanto-amiko Helge Andren. Kia hazardo, kia feliĉo ! Kiam mi iom resaniĝis, mi kun aliaj pacientoj estis transportita en la urbon Boras, kie mi amikiĝis kun pliaj esperantistoj. Ĉiuj estis tre sinceraj, ĉiuj faris multon por agrabligi mian restadon en Svedio. Tiam mi ekkonis la grandegan valoron de Esperanto.

En oktobro 1945 mi adiaŭis Svedion, miajn karajn amikojn. Sed nia amikeco daŭras. Ĝi estiĝis dum cirkonstancoj, en kiuj la humaneco kaj amikeco oni taksas super ĉio. Kaj ĉi tiuj principoj validas ankaŭ hodiaŭ. Fasiĝantaj raĝimoj, koncentrejoj, perfortoj kaj militoj ja ankoraŭ ekzistas. Kaj al tiuj ĉi malhumanajoj ni, esperantistoj, ne povas esti neŭtralaj. Ĉar la ideoj de la amikeco, humaneco kaj paco estas al ni propraj. Tial ni ĉiuj batalu sub la devizo "Per humaneco al la paco" por amikeco inter la nacioj, por la libereco kaj paco.

Josef Buben, ĈSSR

## *Elpensajoj de „Ekstra Bladet“*

Antaŭ kelkaj semajnoj /6.1.1975/ aperis en la danlingva gazeto "Ekstra Bladet" artikolo de Peter Zacho titolita "Letero al la ĉeĥoslovaka ambasadoro", en kiu la aŭtoro klopodas aserti, ke la esperantistoj en Ĉeĥoslovakio estas persekutataj kaj ke iliaj kluboj estas likvidataj !/!. Ne povante doni ajnan pruvon pri tio, ĉefinstruisto Zacho, kiel sin fiere subskribas la aŭtoro, aŭdacas kredi similajn sencensajojn al la dana publiko.

Ĉu vere do okazas persekutoj kontraŭ la ĉs. esperantistoj ? Ĉu pri tio atestu ekzemple la fakto, ke la Ĉeĥa Esperanto-Asocio - unu el la plej grandaj landaj asocioj de UEA, reprezentita tie per siaj komitatoj - havas 6.2600 membrojn /?/. Ni komparu : Danlandon reprezentas en la delegita rato de UEA 80 esperantistoj, dume la "persekutatan" ĉeĥan movadon 168 !

Nature, la subskribinto tute ignoras, ke ĉiujare okazas en Ĉeĥoslovakio Esperanto-aranĝoj auspiciataj de publikaj institucioj, ke la kulturministerio per konsiderindaj monsumoj subtenas la Asocion, kiu havas i.a. oficialajn kontaktojn kun la nacia pacmovado. ĈEA, kiun konsistigas 74 lokaj grupoj, eldonas nuntempe kvar periodaĵojn, librojn k.a. kaj ĝiaj anoj partoprenas en esperantistaj renkontigoj eksterlande.../Oficiale reprezentis la asocion dum la lasta UK en Hamburgo F. Sviták, la vicprezidanto de ĈEA/.

Tiujn ĉi faktojn sinjoro Zacho povis havigi al si el la Esperanta gazetaro aŭ de siaj korespondantoj en Ĉeĥoslovakio, se li havas tiajn kaj se lia intenco estus honesta. Li povis turni sin al sia samlandano E. Windeballe, kiu antaŭnelonge prelegojuĝis en nia lando.

Anstataŭ tio li montras preskaŭ kortuŝan zorgon pri la sorto de la ĉeĥaj esperantistoj. Seriozaj legantoj en Danlando, precipe la esperantistaj apenaŭ kredos la kalamiojn, kies elsputinto senkaŝe klopodas revivigi la entombigitan monstron de la malvarma milito. Por multaj aliaj ĝi estos instruo, kiamaniere oni povas misuzi la t.n. liberecon de la vorto, en kiu la vere tute mankas. /kni/

ATENTU LA REDAKTO-FERMON DE S T A R T O : ĉiam la 30an de januaro, marto, majo, julio, septembro kaj novembro

# MEM-peranto

La 15an kaj la 22an de februaro okazis la tutŝtata kaj la ĉefa pac-konferencoj, kiuj decidis i.a. pri la reorganizo de la ĉs. pacmovado. La celo estas integriĝo kun la Nacia Fronto kaj ties orgenoj. Krome, la proksima agado devas pli sisteme tuŝi la e k s t e r l a n d a n terenon. La ĉefa MEM-sekcio jam estas reprezentita en la eksterlanda komisiono de Ĉs. Packomitato. Ambaŭ preparolitajn konferencojn partoprenis la delegito de AE SSR /la tutŝtatan/ kaj la delegito de ĈEA /la ĉefan/.

**PROTESTLETERON** kontraŭ malobservado de la parizaj packontraktoj fer Usono kaj la saĝgona administracio sendis al Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio la ĉefa sekcio de MEM okaze de la 2-a datreveno de ilia subskribo. Kopioj de la latero estis adresitaj al la ambasadejoj de VDR kaj de Revolucia registaro de Sudvjetnama Respubliko en Praha. La unua adresito sendis responde dankleteron al la sekcio, kiu un subskribis k-do Nguyen Duc Nam, legacia ataŝeo.

**OMAGE AL LA LIBERIGA JUBILEO** oni provizore interkonsentis kun Ĉefa Packonsilantaro eldonon de publikaĵo. Temas pri selekto el la leteratestoj de juna ĉefa kontraŭfaŝista batalantino Marie Kudeříková. Parto de la leteraro, sisteme komplete tradukita de la rondetanoj en Gottwaldov, estis post lingva revizio kaj kun antaŭparolo ekspeditaj al ĈPK fine de januaro.

**KONSENTO PRI KUNLABORO.** La sekretario de Kristana Packonferenco en Praha sendis al la komitatano de MEM-sekcio, d-ro R. Horský, prodekanon de la Hus-fakultato, leteron, en kiu ĝi dankas pro la senditaj Esperanto-publikaĵoj, alte taksante la porpacan laboron de MEM. En la anglalingva letero skribite en la nomo de la ĝenerala sekretario de KP d-ro K. Tóth, oni esprimas la konvinkon, ke per la reciprokaj kontaktoj la laboro por la komuna intereso - la tutmonda paco - estos pli efektiva.

**RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ-PACDEFENDANTOJ** okazos en Ĵizeň /23-26. 5.1975/ omaĝe al la jubileaj tagoj de Ĉeĥoslovakio. La programo inkluzivas ankaŭ publikan kunvenon de MEM.

## *Renkontiĝo kun la latva verkisto*

En klubo de esperantistoj en Riga estiĝis bona tradicio - dediĉi la vesperojn al latvaj verkistoj - poetoj. Sukcese pasis koncertoj dediĉitaj al Eugeno Veveris, Janis Sudrabkalns, Mirdza Bendrupe, Konstantin Aijspura, Antons kaj Paulina Bards kaj aliaj.

Antaŭ nelonge la klubo honoris la poeton Herbert Dorbe, kiu ĉijare iĝis 80jara. H. Dorbe famas pro siaj tradukoj en la latvan lingvon de A.S. Puŝkin, de la romano "Helruĝaj veloj" de A. Grins aŭ de "Rakontoj pri la vivo de K. Paustovskij".

La versojn de H. Dorbe legis latve la fama artistino de LSSR Alma Abele. Tradukojn el liaj verkoj en Esperanton prezentis nia Esperanto-poetino Elvira Lippe. Precipe sukcese sonis versaĵoj de ŝi tradukitaj: "En arbaro", "La ŝatata arbo", "Katida honto", "Epokofara alvoko", fragmento el porinfana libro "La renkontiĝo kun erinaco"...

Konservinta sian energion, vigecon kaj vivĝojon poeto H. Dorbe plezurigis nin per legado de fragmento el sia nova poemo "La balado pri Sarnate", dediĉita al historiaj okazintaĵoj de la latva popolo.

/Laŭ J. Gold en Sovetskaja Molodaĵ/

## ESPERANTO EN DEMOGRAFIO

Ekde la dua jarcent-duono oni povas responde aserti, ke aplikadon de Esperanto en la scienco kaj teknikoj markas pli-malpli oficiala karaktero. Dum antaŭe, progreso tiurilate dependis ĉefe de aktivaj privataj vortaroj, nuntempe ĝi estas akcelata de institucioj, kiuj aprezas avantaĝon de la neutrala internacia lingvo.

Inter institucioj ĉeĥoslovakaj notinda estas la ekzemplo de Federacia Statistika Oficejo, nome de tiu Demografia Instituto. En 1974 aperis, eldonite de la instituto, seslingva DEMOGRAFIA VORTARO /Esperanta-ĉeĥa-rusa-angla-frneca-hispana/. Ĝia aŭtor-kolektivo estas: Dr. J. Fousek, J. Kulíková, E. Pitrdleová, Ing. J. Putík, Dr. V. Srb, S. Zedníková kaj Ing. F. Faktorová /la redaktorino/. La versio esperanta /elaborita de S. Zedníková/ gervas kiel la gvida, laŭ kiu oni aranĝis la tutan vortaron. La antaŭparolo /el la plumo de Ing. J. Kazimour/mencias, ke la ĉeĥoslovaka demografio okupas elstaran lokon inter la naciaj demografioj de la mondo. Ekde 1966 Federacia Statistika Oficejo eldonas kvaronjaran bultenon DEMOSTA, destinitan por informado al fremdlandoj pri la stato kaj evoluo de la ĉeĥoslovakaj statistiko kaj demografio. Tiu ĉi bulteno aperas semtempe en la lingvoj angla, franca, rusa kaj hispana, kum almetitaj statistikaj supervidoj en Esperanto.

La supre nomita vortaro, aperinta okaze de Monda Jaro de Popolacio, devus servi unuevice al la ricevantoj de DEMOSTA, por kiu Esperanto estas fakte la baza lingvo, pontlingvo. Tamen, ĉi senprecedenca vortaro certe interesos la pli vastan publikon.

Se oni foliumas en la pasintjara volumo de DEMOSTA, oni trovas abundon de esperantlingvaj tabeloj pri la ĉeĥoslovaka loĝantaro /vivaĝojtoj, aĝ-strukturo, meza vivlongo en la jaroj 1800-1973 k.m.a./.. Ekzemple sur la koverto de n-ro 2/1974 estas sinoptika mapo, tre instruive demonstranta naturan aikreskon de la ĉeĥoslovaka loĝantaro en 1973, laŭ regionoj: en la regiono mezbohemia ĝi estis minimuma /0,2%/, dum en la regiono orienta slovakia ĝi atingis maksimumon /2-14%/.

La ceteraj ĉeĥoslovakaj instancoj imitu la pioniran paŝon de la demografio, profitante la neutralan lingvon, kiu pretas por servi al ili.

J. Kavka

## LA ESTONTeco DE LL.

Pri la lingvo de l'estonteco - tiel nomiĝas ĉapitro el la verko de la sovetaĵ interlingvistoj Baziev kaj Isajev "Lingvo kaj nacio", aperinta antaŭnelonge en la organo de MEM, Paco.

Laŭ la vortoj de la aŭtoroj, scipovi la ĉefajn eŭropajn lingvojn baldaŭ ne plu sufiĉos, por ke la scienculo kapsblu legi la tutmondan sciencan literaturon. Estas supozeble, ke dum la venontaj jardekoj la pezo de publikaĵoj en la angla, franca kaj germana malpliigos kaj aliflanke pliiĝos la rolo de la japana, hinda, araba kaj suaheliana lingvoj. La aŭtoroj kalkulas, ke en la plej proksima estonteco la nombro de oficialaj internaciaj lingvoj povos pligrandiĝi de 5 al 10 ĝis 12. Tia evoluo subtrekas la neceson akcepti helpan lingvon. Fine la aŭtoroj konstatas, ke la plej grava sistemo de helplingvo estas Esperanto, kiu en la unuaj jaroj de sia ekzistado devis superi samambiciajn projektojn kaj plifortiĝi post la battoj kaŭzitaj de la grandaj militoj. La aŭtoroj pledas por Esperanto.

/laŭ IIS 1975/1/

FILATELISTOJ PER ESPERANTO. Inter la 29.3.-13.4. okazis en Gottwaldow CSSR, ekspozicio de p.m. "Gottwaldow 75", kie oni ekspoziciis ankaŭ du kolektojn je la temo "Esperanto".



# SET LANĈOV 1975

La preparaj laboroj por la Somera Esperanto-Tendaro 1975 estas difinitaj kaj farataj kaj en la regulaĵ kunvenoj de klubaj komitato kaj en la tendarejo en Lanĉov mem, kie precipe nia juna anaro, oferante siajn liberajn sabatojn kaj dimanĉojn, plenumas laborojn neprajn por glata funkciado de la tendaro somere. La prepara komitato por SET kunvenis dufoje : en Pardubice la 2-an de februaro /estis pritraktata la organiza flanko/ kaj en Lanĉov la 25-an de febr./oni fiksis planon de farendaj laboroj/.

La ĉefa problemoj de SET estas la instruistaro. La prepara komitato urĝe kaj insiste petas ĉiujn verajn amikojn de nia paco kaj humana movado, kiuj kapablas instrui, ke ili anoncu sin kiel eble plej baldaŭ al Karel F r a n c, 530 02 Pardubice, Dukla 2287. Nia urĝa alvoko validas ankaŭ por la slovakaj Esperanto-instruistoj kaj lertaj kurestroj.

La unua etapo de SET komenciĝos la 14-an de julio, la dua la 28an de julio. La aranĝo estas ĉefe por la junularo, sed ankaŭ aliaj rajtas partopreni. La eksterlandanoj estas bonvenaj, se ili volas frekventi almenaŭ konversaciajn kursojn. Ĉiu SET-ano devas partopreni unu el la kursoj. La elspezoj estas malaltaj, eĉ se oni loĝas bone kaj manĝas kvinfoje dum la tago. Detalojn petu ĉe Loka Grupo de ĈEA, pk.72, 674 01, Trébič. Limdato por aliĝoj : 15.5.1975. /tk/

## *kursoj kaj pedagogia seminario en Burgas*

Ambeŭ aranĝoj okazos inter la 5a kaj 24a de aŭgusto. La k u r s o j inkluzivas tiujn ĉi grupojn : A-por komencantoj, B-por progresintoj, C-supera kurso, C-grupo por E.-instruistoj. En la p e d a g o g i a s e m i n a r i o rajtas partopreni nur diplomitaj Esp.-instruistoj kaj multjaraj kursgvidantoj. Finante la kurson aŭ seminarion ĉ i u kursano devas submetiĝi al ekzameno. Tiun por instruistoj oni faras antaŭ oficiala ŝtata komisiono.

K o t i z o j : 100 levoj aŭ egalvaloro. Se ne eblas transpago, la kotizo estas akceptata ĉe la alveno, sed kun antaŭizo de la aliĝinto. Pagojn adresu al Bulgario, Sofio, ĉrez Balgarska Van ŝnotargovska banka do D.S.Kasa, Blagoevski rajon, smetka 185/2553 na Sofijski Okrajen Esperantski Komitet. Pri ĉiu transpagita sumo oni tuj informu perletere. La lasta limdato por la aliĝo estas la 31-a de majo 1975. La aliĝilon kun la nomo, naŝkiĝdato kaj preciza adreso tuj sendu al Okrajen Esperantski Komitet, bulv.Āristo Botev 97, Sofio 3, Bulgario /tel. 31-00-29/.

### ARKEOLOGIA ESPERANTO-BRIGADO

/1.-25.8.75/ en Kaliakro, proksime de Varna, atendas la interesatojn. La restad-tago konsistos el ses laborej horoj, liberaj posttagmezoj kaj interesaj vesperaj programoj.

Ĉar la partoprenantoj de Ĉefa Esperanto-Asocio estas limigitaj je 5 personoj, oni elsendos sole tiun junul/in/on ĝis la 26a jaro, kiu bone parolas Esperanton kaj aktive laboras en sia loka grupo aŭ en la porjunulara komisiono. Ĉiu aliĝilo devas esti konfirmata de la LG kaj subskribita de ties prezidanto. La porjunulara komisiono de ĈEA mem faros la finan elekton. La aliĝiloj estas akceptataj ĝis la 15-a de junio. La restado en Bulgario estas senpaga kaj la partoprenantoj ricevas poŝmonon, sed ili kovras siajn vojaĝelspezojn.

# NI LEGIS



ESPERANTO EN PERSPEKTIVO de prof. I. Lapenna /ĉefredaktoro/, U. Lins /redaktoro/ kaj T. Carlevaro. Faktoj kaj analizoj pri la Internacia lingvo. Eldonis CED, 1974, 876 paĝoj.

Estas malfacile fari konkludojn pri la kompendio, kiu aspiras pritrakton de la fenomeno ESPERANTO. Sed jam la subtitolo apenaŭ spegulas la enhavon, ĉar mankas ekzemple la iom detalaj lingvistikaj esploroj, kvankam ja ekzistas pluraĵ kompetentuloj, kies studoj aŭ opinioj la redaktintoj povis atenti, se ili ekspluatis la jam eldonitajn studojn /ekz. la unuaj ĉapitroj sin apogas je "La Internacia Lingvo" kaj la aliaj verkoj de I. Lapenna, la priliteratura parto ĉerpas el liaj manlibroj jam aperintaj, kaj la Persekutoj kontraŭ Esperanto estas adaptaĵo de "La danĝera lingvo" far U. Lins/.

Preskaŭ unu trionon okupas la temo LITERATURO. Nu, ĝi estas sendube la plej multe plugata kampo - kvankam ne nur de kompetentuloj. Ankaŭ ties aprezo montras la simplan fakton, ke mankas al ni la objektivaj kaj sciencemalargumentita literatura kritiko kaj historio en E-o. La aŭtoro de la koncerna parto, medicinisto, sendube kun bona volo montri, ke ankaŭ la Esperanta literaturo jam havas imponan vicon da aŭtoroj, desegnas pli anatomion ol fiziologion de multegaj "skoloj" Cetere tiu ĉi nocio estas pli larĝeenca ol kutime aplikas T. Carlevaro, donante al ĝi strikte nacian kadron. Ni rimarkis ekz., ke Pump kaj Lukáš foje apartenas al la budapeŝta foje al la ĉeĥoslovaka /?/ skolo. Ankaŭ la disdivido laŭ periodoj estas pure mekanika; T. C. neniel klopodas motivigi tiun ĉi disdividon. Oni malfacile orientiĝas en tiu bazar-simila bunto, kie perdiĝas - foje necesaj - limoj inter la evidentaj tradukistoj aŭ verkistoj, inter la sciencaj verkoj kaj beletro, inter artaĵoj kaj balasto, inter la kvalifikitaj tradukistoj kaj tradukantoj /de artikoloj ke/. Pli konvencus karakterizi la ĉefajn tendencojn kaj la ĉefajn aŭtorojn.

Mankas analizoj pri la esenco, signifo kaj sociaj radikoj de la Esperanta literaturo. Tia ĉi laboro ne estis ĝis nun entreprenita, kaj ankaŭ la aŭtoroj de recenzoj, je kiuj svarmas la Esp.-gazetaro, iam provis tion sisteme. Senmotive estas trotakeata en EEP la kontribuo de liaj tn. kulture grevaj verkistoj al la evoluigo de la Esperanta literatura aŭ ties lingvo, kvankam ja nur sporade temas pri evolupretaj aŭtoroj.

Le terminaro aplikata svarmas je tiaj nebulaj kontraŭliteraturistaj esprimoj kiel ekzemple "duageneracia verkisto", "sobra humanisma idealismo", "stranĝatmosfera romano", "modele elegantaj poemoj", "elegante ĉerpi" /?/, "instinkta multimagaa poeto", deliktatsena lirika inspiro" ktp. ktp. Tiu ĉi vortoj estas ofte aprezo de la kreintoj kaj de liaj verkoj.

Ekzamenante ekz. la ĉeĥoslovakon kontribuon al la Esperanto-kulturo, ni rajnas impreson, kvazaŭ ĝin konsistigus nur la "literaturaĵoj", kvankam liaj /menciindaj/ aŭtoroj mankas en EEP, ekz. el Slovakio. Aliflanke estas listigitaj verkoj /tradukoj/ kun relative malalta literatura aŭ faka valoro. Bedaŭrinde absolute mankas mencioj pri la ĉs. aktivecoj sur diversaj aliaj kampoj /la scienco, ĵurnalismo, teatro, instruado, SET, filatelo, stenografio k.a./

Ankoraŭ pli konciza ol la literatura "rubriko" estas tiu pri la ĝenerala movado en ĈSSR, kiu reprezentis sisteme la plej fortan bazon de UEA, kiel menciite. Tiu ĉi "bazo" disponas pri unu paĝo kaj tio pli malpli koncernas ankaŭ la aliajn asociojn /inter kiuj v a k a s la slovaka !! Simila misproporcio estas evidenta ankaŭ en la aliaj kazoj: MEK, kiu renaskiĝis sisteme la movadon en la orienteuropeaj landoj, kie ĝi hodiaŭ aktivas la plej fortaj landaj asocioj de UEA, ricevas nur unu paĝon, malpli ol ekz. Omoto.

Ĝenerale, la verko emfazas precipe la t.n. kulturajn aspektojn de E-o. Tamen, ĉu la kulturo estas ia abstraktaĵo aŭ nura heredaĵo de la unuaj pi-

oniroj, fidanta je siaj propraj fortoj kaj evoluanta preter la ŝtormaj sociaj eventoj? En tiu ĉi senco socia kaj sociala aspektoj de la planlingva problemo estas elstarigendaj kaj la fortoj, kiuj decidus pri la akceptigo de E-o, montrindaj. Simple la vorteton por oni minimume ekvilibrigu aldonante la per. En la epoko de la radikalaj internaciaj ŝanĝoj, de la spacveturoj ankaŭ la IL devas elekti adekvatan adaptiĝon. Ankaŭ la bildo pri la fenomeno ESPERANTO devus esti pli kompleta kaj ĝi devus submeti sin al revizio, se tia revizio povus esti certagrade plenumita en la venonta Enciklopedio de E-o. Tiukaze necesos klare difini ĝin kiel snciklopedion, nepre ne kiel iuspecan kolekton de verkoj aŭ tradukoj, kiel ni jam aludis en la kazo Ĉeĥoslovakio. Ĝi devus esti verko kolektiva en larĝa senco, por ne ripeti la mankojn de EeP.

Kompreneble la praktika valoro de "Esperanto en Perspektivo" estas relative granda. Ĝi povas servi precipe kiel manlibro kaj fonto de informoj.

PANORAMO, antaŭnelonge aperinta literatura almanako de Starto, duobla numero 1974, 44pĝ., ilustrita, alportas tradukojn el la ĉeĥa kaj slovakaj literaturoj, originalajn poemojn kaj eseojn, fragmentojn el la Rememoroj de V. Lebrun pri Tolstoj k.a. Jarabono 16 Kĉs, peras ĈEA.

POLLANDO. Nombroj kaj faktoj. Eld. Interpres, Varsovio 1974, 75pĝ+fotoĝrafajoj. Skizo pri la politika, ekonomia kaj kultura vivo. Aparta ĉapitro pri la esperantista movado en Pollando. Havebla ĉe ĈEA.

PRI LA VARMO. Originala verko en E-o de Ing. JUDF. M. Tůma, CSc. La fundamentaj konsideroj de la scienco pri la varmo. Eldonis ĈEA, 1975, 215 paĝoj, aperis en 1000 ekzempleroj. Prezo: 21 Kĉs.

## KONKURSOJ INTERNACIE

La Pola Radio petas respondi siajn aŭskultantojn jenan demandon: Kiaj pensoj venas el vi lige kun la 30a Jatreveno de la venko super la faŝismo kaj finiĝo de la dua mondmilito? La leteron oni sendu al Polskie Radio, PL-00-950 Warszawa Box 46, Pollando en kovertoj signitaj per la devizo KONKURSO ĝis la 9a de majo 75.

Konkurson por geinfanoj 6-14-jaraj aranĝas Santa Coloma de Gramanet, Esp.-sekcio Avda. Anselmo Riu, 79, Barcelona, Hispanio. En grupo A /6-8j./ oni devas uzi liberan pentrosistemon, en grupoj B /9-11/ kaj C /12-14j./ akvarelan sistemon. La temo estas libera. La formato minimume 25x25 cm, maks. 30x40. Limdato: 31.7.1975.

PORTUGALA KONGRESO. Kiel informas "Esperanto" en pluraj lokoj de Portugalio refundiis lokaj societoj kaj Esp.-kursoj. Portugala Esperanto-Asocio /Rua Dr. Joac Couto, Lote 1238, Lisbon/ anoncis la okazigon de la unua portugala Es-

peranto-Kongreso. Ĝi okazos inter la 7a kaj 10 de junio 1975 en Braga.

LA ĈEĤA INTERNACIE. Laŭ la statistiko de UNESCO la ĉeĥa okupas vere unikan sponon lokon inter la plej multe tradukataj lingvoj. Al tiu ĉi atingo grave kontribuis la fremdlingva eldonejo ARTIA en Praha, kiu dum sia 22jara ekzisto eldonis 5000 titolojn kun eldonkvanto de pli ol 100 milionoj da ekzempleroj.

LA 9-a KUNORDIGA KONFERENCIO por konkordo de Esperanto en lernejojn ligita al la eksperimenta instruado en la t.n. regiono I de ILEI /Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio/ okazis inter la 28.-30a de marto en Maribor, SFRJ.

ESPERANTO KAJ PACO estis la temo de la ekspozicio aranĝita inter la 17.3 kaj 6.4. en Pardubice, ĈSSR. La tradicia renkontiĝo sur la monto Kunětická hora okazos la 24an de majo.

## RONDETA VIVO

FRÝDEK-MÍSTEK - "De Pjatigorsk ĝis Elbruso" estis la publika prelego, kiun prezentis L. Ruzek en la kafejo ESPERANTO enkadre de la Februaraĵ festoj.

HAVLIČKŮV BROD - En la programo por 1975 estas planitaj i.a. poezia vespero honore al S.K. Neumann kaj vespero de la ĉefa poezio, partopreno en diversaj esp. aranĝoj tra la tuta lando kaj kunlaboro kun Distrikta Packonsilantaro.

La LG informis per sia letero la Uzinan Klubon pri la intervjuo kun la ĉefo de la hungaraj sindikatoj S. Góspér /aperinta en Esperantó-Magazin/, kiu pozitive taksis la eblecojn de E-o en la internacia laborista movado. LG proponis, ke la UK pritraktu ĝian enhavon kaj transdonu ĝin al plua prikonsidero al la sindikata fervojista ligo. Tiu ĉi iniciato estas imitinda, ĉar la sukceso de la IL dependas de ĝia diavastigo inter laboristaj amasoj kaj sekve de iliaj organizaĵoj.

Intertempe la socialista brigado "Paco" en la budapeŝta maŝinfabrike "la 4-a de aprilo" decidis el-lerni E-on por kontakti samcelanojn eksterlande. Ĝi invitas al simila paŝo ĉiujn brigadojn en la socialismaj landoj. La eŝo estas gravega, ĉar alie la kontakto ne povus efektiviĝi. Esperantistoj en CSSR ekagu por trovi al la brigado kunulon! /Pri la detaloj legu en Hungara Vivo 1974/6./

HRADEC KRÁLOVÉ - La 25.1. okazis kultura vespero omaĝe al la 30-a datreveno de la liberigo de Ĉeĥoslovakio. Ariojnel ĉefaj kaj rusaj operoj interpretis M. Smyčka, pian-akompanata de M. Tuč. La programon en Kulturdomo de ROH sekvis 70 vizitintoj ankaŭ el Poděbrady, Praha kaj Pardubice. La aranĝon menciis 4 gazetoj. En januaro la klubo malfermis kurson por 10 komencantoj, plejparte junaj.

JABLONEC n.N. - La 20an de jan. la Klubo Festis sian 8an datrevenon. La jarkunveno elektis novan estraron, kiun konsistigas Jíra, Novák, Strnadová, Řehoř, Suchý, Hruška. Ĝojiga estas la konstanta kresko de la anaro: jam ĉiul 1500-a loĝanto en la distrikto Jablonec estas membro de ĈEA.

KYJŮV - LG en sia jarkunveno la 5an de marto konstatis kontentigajn rezultojn de sia laboro en la pasinta jaro kaj preparolis la planon por 1975. La MEM-perantoj Wohl-gemuth konstatis, ke LG havas ses adeptojn de MEM kaj ke oni kontaktas la Distriktan Packonsilantaron. La Uzina Klubo finance subtenas la grupon per 3000 Kčs por 1975.

MĚLNÍK - Al Hungario ekkursis en marto grupo de lerneĵanoj kun sia gvidanto Josef Vitek, prez. de ĈEA.

OPAVA - Pri P. Bezruč kaj lia verko en Esp. tradukoj parolis la 28an de jan. inĝ. V. Kočvara. La kunveno okazas ĉiumarde je 18,30 en la Uzina Klubo Ostroj.

PRAHA - Pri la Venks Februaro kaj pri la kooperativo INTERHELPO, fondita antaŭ 50 jaroj de ĉs. interlingvanoj parolis la 24an de jan. respektive B. Dryák kaj M. Josková.

Modelan instruhoron de E-o prezentis la 17.2. al la gepatroj kaj al EK-membroj en la Klubo de internacieca amikeco, gvidantino de la lerneja infana rondeto en ZDŠ Lindnerova str. instruistino E. Urbanová.

ROUDNICE - 60 personoj ĉeestis la kulturen vesperon /22.1./ kun prelego de d-ro V. Novobilský - "Esperanto en la servo de la ĉeĥa kulturo" - akompanata per apecimanoj el sonbendoj. Sekvis vigla diskuto kaj filmo pri la lastaj kvar renkontiĝoj en Mělník /aŭtoro L. Šperling, Praha/.

VSETÍN - La ĉeĥa-slovaka renkontiĝo okazos en la tagoj 19.-22.9, pli frue ol antaŭvidite en la lastnumera informo.

**F Ā E B Ī Ć** - La LG aranĝas kursojn por komencantoj kaj progresintoj, kiuj gvidas P. Sittauer kaj kurson konversaciajn, kiun gvidas la LG-estro J. Jiřínský. Ankaŭ la paroladoj, kiuj okazas ĉiun duan mardon, estas bone vizitataj. Okazis kaj okazos jenaj:

21.1. Ing. M. Štařný /Heraldiko/ 4.  
2. Th. Kilian /Esperanto-lingvistika fenomeno, 2-a parto/, 18.2. J. Šabacký /Gloraj viroj el la distrikto Třebíč/, 4.3. F. Peštal /Mia vojaĝo tra Hungario/, 18.3. J. Poláček /La fondintoj de la scienca socialismo/, 1.4. Ing. Ā. Folk /La vertebruloj/, 15.4. d-ro J. Lařtovička /La civila leŝaro-posedrajto, kunposedrajto/, 29.4. J. Höfer /La baroko de Jaroměřice/, 13.5. J. Jiřínský /La koloro kaj kolora harmonio./

**Ĵ A M B E R K** - Okaze de la 10a datreveno de la LG la anoj aranĝis solenan vesperon la 29an de dec. La partoprenintoj rememoris i.a. la viziton al la UK en Budapeŝto kaj rakontis pri siaj travivaĵoj el fremdaj landoj /Sovetio, Nederlando, Belgio, Svedio, Finnlando/, kie ili vizitis siajn Esperanto-amikojn. Oni aranĝis ankaŭ malgrandan ekspozicion de esperantantoj kaj unuanime decidis, ke ĉiuj grupanoj partoprenos la tutŝtatan renkontiĝon en Vsetín.

### KRONIKO

En aprilo-majo festas siajn jubileojn PhMr Ludmila Flanánská /75j./, Anna Bursová /70j./, Jan Věclav /65j./, Josef Hříž /55j./ kaj Drahoš Budaňák /50j./, ĉiuj el Praha. Al la jubileantoj nian fratulon!

Forpasis en Praha Bedřich Drýáček, oferema kaj longjara komitatano de EKP. Honoron al lia memoro!

Por la komuna vivo decidiĝis la 19an de aprilo A. Krupková Došťálová kaj Jaroslav Klimenta en Karlovy Vary.

**DIPLOMO AL V. HASALA.** Diplomon kaj honorinsignon de la III-a grado ricevis pro sia sinofera laboro V. Hasala, vicanto de la komisiono "Esperanto" ĉe Ligo de ĉefaj fi-

lialistoj. La laboron de V. Hasala la apreziis ankaŭ la estraro de ĈEA en sia kunsido la 15an de marto.

### VIZITE EN M.I.E.K.

La 26an de marto ni havis la okazon persone sperti la spadon de Moskva Internacia Esperanto-Klubo. La merkredaj kunvenoj estas pure laboraj: unu grupo sub la gvido de N. Danovskij tradukas el la rusa literaturo /partoprenis proks. 15 personoj, lingve jam spertaj/. Alia grupo, gvidata de doc. Tokerev, profitas de popularaj kantoj el la ĉiujaraj tendaroj. - La ĉefaj kunvenoj okazas dimanĉe ekde la 14-a horo en la Centra Domo de Kulturo de Medicinaj Laborantoj, ul. Gerceva 19, 103009, Moskva K-9. La vizitantoj de Moskvo povas sin anonci ĉe la prezidanto E. T. Solnikov, tel. 236-40-92. La klubo havas praitajn programojn por duona jaro.

Z. Bráček

**LA PORJUNULARA KOMISIONO DE ĈEA** invitas vin al la II-a Junulara danvespero okaze de la XI-a seminario de la Esp.-junularo la 2an de majo en Mělník. Muzikas la grupo "Neretis" kun siaj solistoj J. Havelka kaj P. Skála. Enirpago 10Kčs.

**EKSPOZICIO EN DUDINĜE.** En tiu ĉi malgranda banloko apud Zvolen, Slovakio, troviĝas konstanta ekspozicio de oleopentraĵoj, kiuj donace akiris s-ro A. Věna de siaj gemikoj - nederlandaj esperantistoj. - Somera E.-lernejo okazos samloke inter la 6a kaj 20a de julio, fin sekvas Kultur-Turisma-E.-Semajno /"En la postsignoj de manaj liberigintoj"/ kaj la 5-7an de sept. amika esp.renkontiĝo.

**ALIGU AL V.E.K.** Ĉiuj esperantistoj, kiuj pli ol 40 jarojn fidele aktivis en la movado, povas uniĝiĝi sen pagi membrokoton - al Veterana Esperantista Klubo, sendante koncizan biografion al ties sekretariino Julie Winter, Obere Str. 8, D-3249 Wolfhaagen, FRG.

**AMIKECO FRANS LIMOJN.** Lige kun la Semajno de Interacacia amikeco al-kore salutas la leantojn de Starto anoj de Ĉiuj Esperanto-Klubo.

## INFORMACE SEKRETARIÁTU ČES

VÝZVA ČLENŮM ČES. Žádáme všechny naše členy, kteří jsou právníky a vykonávají advokátskou či soudní praxi, nebo se zabývají hospodářským a majetkovým právem či právními otázkami v souvislosti s existencí společenských organizací, aby se přihlásili svazu, chtějí-li pomoci při obhajování jeho zájmů. UV ČES má v úmyslu vytvořit komisi právníků jako svůj poradní orgán.

Žádáme rovněž členy svazu, kteří pracují v orgánech Národního shromáždění, aby rovněž podali sekretariátu svazu příslušnou informaci. Pokud naši členové vědí o vlivných neesperantistech ve svém okolí, kteří esperantské hnutí podporují nebo s ním sympatizují, ať sdělí jejich adresy.

STARTO je nyní pravidelně čteno a odebíráno i v Sovětském svazu. Jeho tamní distributorem se stal A.S.Mělnikov z Rostova na Donu. Mnoho členům našeho svazu jsme zaslali novou přílohu svazového časopisu - PANORAMO, které jsme vydali v 1000 výtiscích - a očekáváme, že si tento elmanach buď předplatí /za 16 Kčs ročně/ nebo výtisk co nejdříve vrátí. Další přílohou, kterou předplácují zájemci v několika zemích, jsou MEDICINISTAJ INFORMOJ za 25 Kčs ročně. Všechna tři periodika mají jednotný formát A5.

SVOJI KNIHOVNIČKU si můžete doplnit několika publikacemi, které nabízí sekretariát ČES. Jsou to :

PLENA ILUSTRITA VORTARO (cca 600 Kčs), ROZMŔŔOWKI ESPERANCKIE (konverzace od A.Pettyne) za 10 Kčs, ROZHĽASOVÝ KURS ESPERANTA (slovenský, 135 stran), LA PERDITA VIZAĜO od J.Nesvadby - deset nspíneových povídek s vědecko-fantastickými náměty, za 15 Kčs, POLLANDO, nombroj kaj faktoj, 76 stran.

Čs.exportní organizace ARTIA uveřejnila ve svém nabídkovém seznamu tištěném pro SSSR čtyři publikace ČES : APOKRIFOJ K.Čapka, SILEZIAJ KANTOJ P.Bezručě, LA PERDITA VIZAĜO J.Nesvadby a PAŜOJ AL PLENA POSEDO W.Aulda. Knížky lze nyní objednat v sovětských prodejnách a bude-li zájem, doveze je podnik "Meždunarodnaja kniga". UPOZORNĚTE NA TUTO MOŢNOST SVĚ PRATELE V SOVĚTSKĚM SVAZU !!!

### NABÍDKA PRO

SBĚRATELE : Sekretariát má pro vás tyto odznaky:

- sovětský - kulatý, s esp.hvězdou. Provedení v zelené, stříbrné a modré barvě. Cena 5 Kčs.
- maďarský - znak 51.svět.kongresu v Budapešti, mnohobarevný, cena 5 Kčs.

### OBJEDNEJTE

SI SAMOLEPKY "Per Esperanto por la mondpeco"-kulatá čtyřbarevná, aršík o 24 exemplářích za 5 Kčs  
"Esperanto vás spojí s celým světem", obdélníková, 28 ks. za 6 Kčs.

DOBROVOLNÉ DARY. T.Kilian 500 Kčs, R.Kosík 10, S.Marková 10, F.Arnošt 10, J.Škoda 35, T.Houska 10, S.Ceňal 29, R.Kopecká 17, manž.A-ďemcovi 15, A.Holzerová 10, M.Sváček 10, M.Vošurda 30, R. Poděpěl 12, B.Uher 10, MUDr.J. Novotný 10. Všem dárcům srdečný dík !

PEDAGOGICKÁ SEKCE ČES má k dispozici program o životě a díle St. Schulhofs. Zešlete sekci prázdný magnetofonový pásek a 23 Kčs plus poštovné na adresu : J.Rybáčková, Na Okrouhlíku 953/21, Pardubice.



## FERVOJISTA SEKCIO

LG ĈEA en Ĉeská Třebová daŭrigas publikajn prelegojn. La unua, akompanata per koloraj diapozitivaj, rakontas pri la pasinteco de la urbo kaj komparas ĝin kun la nuntempa vigla evoluo. La dua prelego nomiĝas "Tra Francio al Hispanio" kaj priskribas la vojaĝon al la XXVI-a IFEF kongreso en Tarragona. Per plua prelego oni denove revenas al ĈSSR, montrante belecon de Orienta Bohemio. La nuntempan vivon kaj pasintecon de la socialismaj landoj priskribas: Tra la landoj de niaj amikoj. Kaj la lasta, preparata prelego, memorigos per sia enhavo pri la 30a datreveno de liberigo de nia lando kaj nomiĝos "Tra liberigita Ĉeĥoslovakio". F. Slezák prelegis lastatempe pri sia vojaĝo al Svedio, Norvegio, Danlando kaj Finnlando.

Estis elektita nova komitato de la rondeto AMIKECO en Ĉeská Třebová. La prezidanto fariĝis la juna longjara esperantisto Pavel Batěk. Esperanto estas instruata en tri kursoj. Nunjare oni festos la 15-an fondo-datrevenon.

OMAGE AL LA JUBILEO DE ĈSSR FS ĈEA aranĝos en oktobro la solema konferencen en Ĉeská Třebová sub la signo de MEM, samtempe festante per ĝi la 10an datrevenon de sia konstituigo.

SUKCESAN, JAM LA VI-an ESPERANTO-BALON, aranĝis la fervojista Esperanto-rondeto en Ĉeská Třebová. Inter la gastoj el diversaj lokoj de Bohemio kaj Moravio venis ankaŭ gekolegoj el GDR, Hungario kaj FRG. Antaŭ pli ol 300 partoprenantoj kantis M. Voleská polkon "Esperanto" kies tekston verkis F. Slezák.

LA ESTRARO DE FS atentigas siajn anojn, ke ĝi renovigas la sekcian kartotekon. Kiu emas aniĝi aŭ kiu ĝis nun ne ricevis la aliĝilon, nepre skribu al F. Markl, S.K. Neumanna 359, 560 02 Ĉeská Třebová.

KIUJ ANOJ DE FS ĝis nun ne ricevis la "Enketilon" pri interesaj rilate al la fervojista Esperanto-movado en nia lando, mendu ĝin ĉe S. Helmečzyová, 252 31 Všenory 176. La sekcia komitato sincere dankas al ĉiuj, kiuj ĝin resendis. La rezulton de la enketado oni publikigos en la venonta rubriko.

ESTIS ELDONITA LIMIGITA KVANTO DA INTERESAJ BELAJ INSIGNOJ de la sekcio. La insigno /vidu supre, en la titolo/ estas dukolora, sur la verda stel-spaco troviĝas signo de fervojistoj. Unu insigno kostas 7 Kčs + francon. Interesatoj mendu ĝin ĉe S. Helmečzyová, 252 31 Všenory 176. Oni preferas amasajn mendojn.

EN BUDAPEŝTO la tiea Trafika muzeo surprizis lavizitantojn per alloga ekspozicio de pligrandigitaj desegnaĵoj pri la trafiko /vidu la apudajn bildojn/ el populara hungara ŝercgazeto "Ludas Matyi". La ekspozicion vizitis dum du monatoj pli ol 30 000 personoj, inter kiuj estis ankaŭ anoj de nia sekcio.

GRATULOJ AL SPARTO. "En nomo mia kaj tiu de nia grupo en Vsetín mi kore gratulas por la belaspekta revueto. Ni esperas ricevi ĝin regule sesfoje jare kaj penas laŭpove helpi Vin..." A. Berka, esperantisto ekde 1925



## korespondi deziras

**RUMANIO** Ceanoj de la ER "Steletu" el urbo Suceava /nia mallongigo S/ SIMIONIUŬ Oheorgho, str. 23 August 225, 5805 S /18j./, MARCHIDAN Oviidiu, 23 Aug. 197, 5803 S /18/, CIORNEI Ilie, Pirvan 22, 5803 S /18j./, MURARU Dan, str. Zefirului 2, 5803 S /18j./, DANCIU Dan, 6 Noiembrie 13 -B-17, 5801 S /18j./, ANDRIEȘ Mircea Alexandru cel bun 26-3, 5801 S /17j./, CUCURUZEAC Nicu, Alexandru cel bun 26-3, 5801 S /17j./, MOȘNEȘTIU Dumitru, Marașești 29-B-8, 5806 S /19j./, MURARU Adrian, Al. Nacului 11-14, 5801 S /17j./, SCUTARU Dorel, Gh. Doja 64, 5803 S /17/, NEDELCU Sorin, Al. Pinului 5-B-2, 5801 S /15j./, CIORNEI Liviu, str. Alexandru cel Bun H2-A-5, 5801 S /17j./, f-ino COSTINIUC Lecriimioara, jud S, 5810-Ipotești-Lisaure /18j./, f-ino MARIANA Cirsteanu, Stefan cel Mare 93, 5875-Redauti-Bucovina /17j./, f-ino HUTANU Viorica, SSC, str. Bucovina 15-A, 6801-Botoșani /18j./, f-ino RODICA Asimionoaie, GSC, str. Bucovina 15-A, 6801-Botoșani /18j./, TRIHOB M.V. Oltea, ju S, 5810-Ipotești-Tișauti /17j./, f. COSTIUC Liliana, Liceul Industrie Alimentara, 5806 S /17j./, f-ino TERNEANU Pinareta, LS-8ul 1 Mai 21 5806 S /18j./, f-ino CIUBOTARIU Lidia Ciubi, Trandafirilor 12-A-8, S 5801 /17j./, f-ino ROSU Irina, Cal. Unirii 54 bis, 5803 S /15j./, MIHAELA Zaharescu, Balcescu 5-C-4, 5801 S /17j./, f-ino MACIUC Lidia Cimpului 38, 5805 S /17j./, f-ino COCA Dobroghiu, Plevnei 88, 5803 S /18j./, MURARU Elena, Petru Rareș 60, 5801 S /19j./, f-ino TIMOTTE D. SPS cum 16, Bul 1. Mai 21, 5806 S /20j./, prof. APETROAIE Teo, Scoala Generala nr 1, 5801 S /34j./, prof. IOAN Neamu, Al. Marașești 32-9, 5806 S /34j./, prof. SABIN Florea, Stefan cel Mare 62-9, 5801 S /29/, f-ino

prof. MANTA Heritonov, Pintilie 29 5801 S /29j./, f-ino DASCULESCU M. Institutul Pedagogic, 5806 S /22j./, SORIN Mihailescu, Inst. Pedagogic, 5806 S /22j./

Pri la certa respondo kaj akurat eco respondecas la rondgvidanto : Mihail Petre Dumpeanu, PO Box 502, 5806 Suceava.

**SOVETIO** - Ksenia PAAS, Saturni 7-B 200012 Tallinn, Igtona SSR, s-ro Johannes KANCRO, Sutiste 35/2, Tallinn 200034, s-ro Kamil KAZAKOV, Baškira SSR, 452410, Iglinskij r. str. Iglino, Oktjabrskaja 5, Aleksandr EKKEL, Vjatskaja 21, 310 C13 RAROKOV;

**POLLANDO** - Teresa kaj Tadeo SZUMANOWSKI, 20j. gestudentoj, 58-420, Lubowka, ul. Dlugosza 1, Czeczyna SZYMAŬSKA 15j., 50-420 Wroclaw, Traugutta 102 m 12, Jozef KOSIŬSKI, Dlugopole Dolne 5, 57-520 Dlugopole Zs. pow. Bystrzyca Kl., Ernes TEWS, Os. Wloknarzy 5 m 18, 58-260 Bielawa;

**HUNGARIO** - Éva HORVÁTH, 9700 Szombathely, Domgnkos ut. 10, Éva SÓS, 15j., 9025 Győr, Achim A. 64/B;

**ITALIO** - Por siaj 20 gestud./15-20j./adr. serĉas prof. G. ZAPPULLA, Instituto Tecnico "C. Gemellaro, Piazza Vaccarini", 95124 Catania, s-ro MARSEGLIA Rafeale, C. Grosseto 65, 10100 Torino /24j./

**JAPANIO** - KAZUYO Unno, 21j. oficistino, Shigarami 1571-7, Kambara-cho Ihara-gun, Shizuoka-ken, 42132

**SILVO DE LA KRUCENIGMO** /en la unua n-ro/: "Kiu ne akiras, kiam li povas, tiu poste deziras, sed jam ne retrovas" /sendis M. Hromas/.

**S T A R T O** - eldonas Ĉefa Esperanto-Asocio en Praha. Respondeca re-  
 direktoro Oldřich K n í ch a l. Redakta konsilantaro : ing. E. Felix, J.  
 Mařík, ing. F. Sviták. Grafika aranĝo J. Klement. Aperas sesfoje po jare.  
 Dobl. poŝta Praha 07, sniř. poŝt. poplstek povolen RP Praha j.z. P/1 -  
 2283/1971. Toto číslo bylo předáno tiskárně 17. dubna 1975. Adresa  
 Českého esperantského svazu : Jilská 10, 110 00 Praha 1, tel. 220 262